

La vorto pridemandas nin - renkontiĝoj

Kiam la konscio estas duondormema....

LA UNUA TAGO DE P. ALBERTO MAGGI

(Vendredon la 16an de novembro dua parto)

Mi malsatis, kaj vi ne donis al mi manĝi (mt. 25,42)

re prilaboro de Giuseppe Castellese

el la kunveno de Cefalù 15an- 18an de novembro 2007

Kun Jesuo, Dio ne plu estas "sankta kaptito"

La karakterizaĵo de la religio (de ĉiuj la religioj en ĉiuj tempoj) estas "havi la ekskluzivecon de Dio": iun neatakeblan privilegion per kiu dikigi ĝian sacerdotaron. Oni povas renkonti Dion nur en la domo mastrumata absolute nur de la sacerdota klaso, la templo, kie la eniro estis permesita nur al malmultaj elektitoj, al malmultaj apartigitaj homoj super ĉio elektitaj pro la riĉaĵo laŭ fiksitaj kondiĉoj kaj precizaj ritaroj. Do, ni diros ke la "homamaso", la mizeruloj, la pekuloj, la malpuruloj restis ekstere de la ĉeesto de Dio kaj tio okazis same ĉu oni ne povas (soci-ekonomiaj kialoj), ĉu oni ne volas aŭ estas en sia propra "antaŭvidita morala aŭ religia kondiĉo kiu flankenpuŝas lin. Sed kun Jesuo Dio foriras el la templo kaj iras renkonten ĝuste al la forpuŝitoj. La oficiala "diskrimina kondiĉo" estis la "malpureco": se vi ne estas pura, vi ne povas esti akceptita en la ĉeesto de Dio (kiu estas absolute pura kaj sankta) tion diras la leĝo de la sacerdotoj. Kiel eblas vin purigi? Nur se vi oferdonas al Dio la kapron (pura ĉar ĝi estas bredita laŭ la templaj reguloj) Kun Jesuo la tuta "komerca" strukturo falas, oni ne plu devas distingi la purajn disde la malpuraj, la observemulojn de la malobservemuloj; la akceptitajn de la forpuŝitaj. Ankaŭ Petro, post la sperto de la Centuriestro, kiam li vidas la Sanktan Spiriton kiu malsupreniras paganon, (neverŝajnaĵon kaj nekredeblaĵon), li komprenas ke ekzistas eĉ ne unu homo forpuŝita de la amo de Dio. Jesuo malfermas la trajrejon kaj iras renkonten al la homaro.

La krimo de la religio: la invento de la peko

Por pluteni la ekskluzivecon de la sanktaĵoj la religio "persvadas la homojn pri peko": vi estas pekuloj do, vi ne povas aliri la Sinjoron krom ke vi venas ĉe la sacerdotoj kiuj vin purigas. Sed al tiuj ĉi homoj timigitaj de la religio, nun iras renkonten Jesuo: tiuj ĉi homoj konvinkitaj ne plu povi alproksimiĝi al la dio de la templo, nun ili havas la Dion Jesuon kiu iras renkonti ilin por komuniki al ĉiuj la amon. Dio neniun ekskludas: ekzistas "eĉ ne unu homo" kiu povas sin senti ekskludita de Dio pro siaj kondiĉo aŭ persona pozicio. Kun Jesuo efektiviĝas

“radikala ŝanĝo” rilate la sintenon de la kredantoj, la diskrimina kondiĉo ne plu estas la respekto pri la leĝo, sed ĝi estas la amo de la Patro, kaj super ĉio “kion vi faras” al la fratoj.

Ekde tiu tempo Jesuo “ignoras la leĝon de Dio” (la leĝo de Moseo) simple ĉar la leĝo ne ekzistas: se Dio estas amo, Li ne povas sin esprimi pere de la leĝo. Kaj la “leĝo” restas kiel la “malplena ujo” de ĉiam instrumento por la povo, la regado kaj la prestiĝo de la religiaj aŭtoritatuloj. La pruvo por ĉio? En la Evangelioj neniam oni vokas la leĝon favore al la homoj, sed ĉiam ĝi estas vokata favore al la sacerdotaro; neniam la sacerdotoj citas la dian Leĝon kiam ĝi favoras al la homoj.

Jesuo kontraŭstaras la religian terorismen

Kaj, do, Jesuo neniam agas ĉar Lin movigas la leĝo de Dio; Li agas ĉar Lin movigas la amo de la Patro: neniam por la bono de la doktrino sed ĉiam por la bono de la homo.

Jen kie kaj kiel aperas la “pensmaniero” de Jesuo koncerne tion: “kaj ĉiuj la paganajn popolojn oni kunigos antaŭ Li kaj Li apartigos ilin unu de la alia kiel la paŝtisto apartigas la ŝafinojn disde la virkaprojn”.

Ĉar la religio ne povas konvinki “la personojn” (homo rezonanta per sia propra kapo ne akceptas la neraciajn regulojn de la religio), por persvadi la homojn al plenumiĝo de ĝiaj ordonoj la religio sin turnas al terorismo: jen formulita la terorisma minaco: kiu malobeas la leĝon, prezentita kiel dia leĝo, tiu estos abrupte trafita de ĉiuj malfeliĉoj de la mondo. Kaj jen, ekzemple, la 52 malbenoj el la Readmono, ĉapitro 28,15; ..., “Sed se vi ne aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via Dio, penante plenumi ĉiujn Liajn ordonojn kaj leĝojn, kiujn mi transdonas al vi hodiaŭ, tiam venos sur vin ĉiuj ĉi tiuj malbenoj kaj atingos vin”.

Kion diri?!: Tiu estas la libro de la Readmono, ĝi estas “dia vorto”. Kaj la dia vorto ne trompas! Kaj la homoj kredas je ĝi kaj super ĉio ili ĝin timas! Kiel ne timi kiam el 52 malbenoj oni vin promesas 52 el 52! Kaj ek kun la selektaĵo! “la timego, la pesto, la febro, la karbunklo, la ulcero, kaj poste (ho la fantazio de la eterna patro) la hemoroidoj el kiuj vi ne povos resaniĝi!”

Sed ankoraŭ: la venĝo de la Sinjoro ne laciĝas. Li vin trafos per blindeco, per mensa konfuzo; li vin frapos en la genuoj, en la femuroj per maligna ulcero. Kaj poste la ruza malico: vi fianĉiĝos al virino sed aliulo vizitados ŝin; via bovo estos buĉita sub viaj okuloj sed vi ne manĝos el ĝi. Kaj eĉ: “pesto, konsumiĝo, febro, inflamo, soifemo, rusto, la dek plagoj de Egiptujo, bubonoj, skabio, prurigo, deliro, blindeco kaj frenezeco”. Kaj fininte la verkisto ne kontentigita....Kaj se mi eĉ estus forgesinta iun malbenon, tiam ankaŭ la sennombrajn malsanojn ne menciitaj en ĉi tiu leĝo la Sinjoro malsuprenirigos ĉe vi.

La bildo pri abomeninda diaĵo

Tiel la Sinjoro "plezurigos sin" pereigi vin kaj vin detrui forŝiritajn de via lando... kaj se vi reiros al Egiptujo Li plezurigos sin vin oferedoni kiel sklavojn...la aĉetonto mankos!

Je la fino... ni ridis! Certe, antikva teksto taŭgas por rido; tamen atentu, eble post kelkaj jaroj aliajn, kiom multe ili priridos nin kaj niajn timojn. Atentu! Ĉar la religio daŭre uzas la timigilojn kaj terurigilojn. Kontraŭ tiom da ekstravaganco restas al ni nenio ol "malfermi la okulojn" kaj kreski laŭ la instruo de Jesuo.

La timego pri la lasta juĝo

Terorismo eĉ sur ni? Fakte iu bildo angorigis generaciojn da kredantoj: temas pri la bildo de la lasta juĝo. Tamen hodiaŭ ni havas la bonŝancon pruvi ke tiu minaco ne havas ekzistorajton en la Evangelio. Certe la pentristoj kontentigis siajn kapricojn bildigante tiun juĝon: sufiĉas pripensi la Sikstan Kapelon: tie, al malmultaj elektitoj (preskaŭ ĉiuj religiuloj) respondas grandega amaso da damnitaj en scenejoj kie ŝajnas ke oni elverŝis la supermezurajn sadismon kaj masohismon. Sed kiel ne memori ke ĝis antaŭ kelkaj jardekoj oni perforte agis kontraŭ la popola fantazio? La tago de la lasta juĝo... ni estus havintaj ĉion skribitan sur nia frunto; ĉion ajn eĉ la plej etajn petolaĵojn. Ĉion, ĉion, ĉu vere ĉion? Kaj ĉiuj alkuris kovri sian fronton!

La juĝo de tiu terura Dio! Kaj... ĉe la Gregoria, la papa Universitato vizitita de pastroj, de fratinoj, de engaĝitaj laikuloj, al la demandaro "se en la tago de la lasta juĝo vi povus elekti la juĝiston, kiun vi preferus?" Atentu: neniu elektis la Eterna Patro, kaj anstataŭe, je la unua rango troviĝis la Sankta Virgulino, poste, la Papo Johano la dudektria, kaj je la tria rango troviĝis subklasigita Sankta Jozefo.

Jen la frukto de la krimo flanke de la religia institucio: ĉi tie estas vera blasfemo; la blasfemo al la vizaĝo de Dio kiu prezentas la kreitaĵojn kiel plej bonaj ol la Eternulo.

Por la kredantoj neniu juĝo

Nu tiom da terorismo estas senkaŭza! Kial? Ĉar la "lasta juĝo" simple ne troviĝas en la Evangelioj: jen kial gravas la ĝusta interpretado de la Evangelioj.

Jen la konturoj de la problemo: ĉiukaze la juĝo pri kiu parolas la evangelio rilatas la paganajn naciojn (etnojn) kaj ni jam konsoliĝas ĉar ĝi rezultas "malpli universa": ĝi ne estas por la tuta mondo. Jes, ja, veras ke ekzistas la juĝo por Izraelo, kiun Jesuo konfidis al dekdu disĉiploj (la dekdu triboj) kaj poste ekzistas tiu juĝo limigita al la paganaj homoj.

Kaj por la kredantoj? Por la kredantoj ne ekzistas iu ajn juĝo. Pro la fakto ke ni akceptis Jesuon kiel modelon por nia vivo kaj ĉar ni orientigis nian vivon al la bono de aliuloj, ni jam estas en la pleno de la eterna vivo. Estas neniu juĝo por kiu kredas je Jesuo kaj Lin sekvas. Tial Sankta Paŭlo en siaj leteroj eĉ aŭdacas diri "ni kiuj jam estas resurektintaj"; kaj, do, ni kiuj akceptis Jesuon, ni kiuj

orientis nian vivon al la bono de la aliuloj eĉ inter la malfacilaĵoj, la malperfektaĵoj kaj la feblecoj kiuj nin ĉagrenigas, ni jam estas en la pleneco de la eterna vivo kaj ne iras renkonten al iu ajn juĝo.

Kaj jen la deviga demando: se ekzistas homoj kiuj neniam aŭdis paroli pri Dio, tiuj kiuj neniam Lin konis laŭ kio ili estos juĝitaj?

Tiam la reĝo...

Ni rekonfirmas: Izraelo estos juĝita de la 12 disĉiploj; poste venas la juĝo por la paganaj etnoj.

Tiukaze valoras kio estas skribite: "kaj Li apartigos ilin unu de la alia kiel la paŝtisto apartigas la ŝafinojn disde la virkaprojn".

Mallonga esploro pri la vorttrezoro uzata de la evangeliisto: antaŭe Jesuo prezentis Sin kiel la filo de la homo nome kiel la homo atinginta la dian kondiĉon; nun Jesuo sin prezentas kiel paŝtisto. Tie ĉi evidentiĝas neniuj timoj aŭ timigo: la paŝtisto estas Jesuo, la paŝtisto kiu zorgas pri la ŝafoj, la paŝtisto kiu serĉadas la perditan ŝafon, la paŝtisto kiu oferdonas la vivon por siaj ŝafoj.

Kaj, do, la paŝtisto apartigas la ŝafinojn disde la virkaproj. Jesuo parolas laŭ facila maniero: Li realkroĉiĝas al la palestina kutimo de la beduenoj. Ĉe tiu ĉi popolo vespere la ŝafaroj estis disigitaj por la melkado. Kaj tiam "Li metos la ŝafinojn je sia dekstra flanko kaj la virkaprojn je sia maldekstra flanko.

"Tiam la reĝo..." la leksikaj transiroj estas gravaj: antaŭe la filo de la homo, poste la paŝtisto, poste la reĝo: ĉi tie oni celas la modelan reĝon, tiu laŭ la tipo de la reĝo kiun Izraelo atendis post la seniluziiĝo de la monarkio: en la biblia tradicio la idea reĝo estas tiu kiu prizorgas la georfojn kaj la vidvinojn. La georfoj kaj la vidvinoj estas du homaj kategorioj kiuj ne havas viron, masklon kiu prizorgu ilin. Tiam la reĝo en la hebrea simboliko indikas tiun kiu prizorgas ĉiujn kiujn neniuj prizorgas.

Venu benataj de mia Patro

Jen Jesuo sin prezentas kiel la reĝo kaj li diros al kiuj staras dekstre de li: venu, ho vi benataj de mia Patro, ricevu kiel eredaĵon la regnon preparitan por vi ekde la kreo de la mondo.

Konsiderinte antaŭe la hebrea tradician, poste lakristanan laŭ kiu "la reĝo estus leginta en la libro", ni nin demandas: kiel faris Jesuo por koni tiujn kiuj estas benataj?

Jen la respondo: li faris kiel la paŝtisto kiu apartigas tiujn kiujn kiuj orientigis iliajn vivojn al la bono de la aliuloj kaj tiujn kiuj kontraŭe vivis nur por sin mem.

Ĉion Jesuo jam antaŭfiguris en la Evangelio: en la fiŝreto tirita de la fiŝkaptistoj troviĝas bonaj kaj putraj fiŝoj (ne ekzistas malbonaj fiŝoj ĉar Jesuo ne verdiktas pri moralo): la fiŝoj ne estas malbonaj, ili estas sen vivo, ili putras kaj pro tio oni ilin forĵetas. Ili ne estas forĵetitaj pro ilia konduto sed ĉar temas pri putraj senutilaj fiŝoj.

Jesuo tuj distingis tiun kiu vivis por la aliuloj kaj diras al ni ke kiu orientigas sian vivon al la aliuloj, tiu komencas en si mem laŭgrada transformiĝo eĉ en la korpo.

Se la okulo kiu estas en vi lumas, eĉ via tuta korpo lumas.

La brila okulo laŭ la hebrea esprimo sinonimas malavarecon. Kaj kiu estas malavara? Kiu orientigis sian vivon al la aliuloj. Homo vivanta por la aliuloj, eĉ ni diras tion, estas homo admirinda.

La patro de Jesuo ne estas la Dio de la religio

Jesuo, do, ne bezonas konsulti la libron, Li vidas propraokule. Kaj Li vidas la homojn kiuj brilas kaj la homojn kiuj, male, mallumas. Kaj jen la indiko de Johano la Evangelisto: antaŭ ĉio estu "benataj" de mia Patro. La patro de Jesuo benas tiujn homojn kaj ni vidos kial, kaj li diras: ricevu la regnon kiu estis pretigita por vi ekde la kreo de la mondo.

La Dio kiu aperas en la Evangelioj, la Dio de Jesuo, la Dio kiun oni evoluigos kaj komprenigos laŭ teologia vidpunkto, post ĝisfunda pripenso, estas Dio tute malsama ol tiu de la religia tradicio. La Dio de la religio estas Dio ĉiam malkontenta pri la homaro, Dio kiu prezentiĝas, rigardas la teron kaj retiriĝas naŭzita: ili ĉiuj estas malicaj, malbonaj, ili ĉiuj estas pekuloj tiu estas la dio de la religio.

La Patro de Jesuo rigardas la homaron... kia mirindaĵo! Kiel belaj estas la homoj! Kaj Li eĉ ne havas vidan malperfektaĵon, ne temas pri la fakto ke li ne vidas la realon tiun kia ĝi estas, sed Dio vidas la homon tian "kia li povas fariĝi se li akceptas Lian amon"

Dio tiel enamiĝinta en sia kreitaĵo

Li estas Dio tiel enamiĝinta en sia kreitaĵo ke, tion diras Jesuo kaj la vorto de Jesuo estas vera, ekde la kreo de la mondo, do eĉ antaŭ la kreo de la mondo, Li pripensis ĉiun el ni... por kio? por doni la regnon al ni kiel eredaĵon.

Klopodu nun kompreni tiujn esprimojn; ili estas dirmanieroj, vortoj tiom foraj de ni ke ili al ni ŝajnas nekompreneblaj. Tial ni helpigas nin de Sankta Paŭlo: la letero al efezanoj malfermiĝas per himno kiu estas la mirindaĵo pri la

optimismo de Dio rilate la kreaĵojn. Sankta Paŭlo diras ke "en Li, en Jesuo, Dio nin elektis antaŭ la kreo de la mondo.

Do, ni pripensu tion: eĉ antaŭ ol krei la mondon Dio pripensis min. Li pripensis ni ĉiujn. Pro kio? Por fariĝi el ni adoptaj filoj.

Ne filoj, sed adoptaj filoj

Estas eksterordinara esprimo: la adopto fare de potenculo, ne estis adopto kia ni ĝin komprenas, ĝi ne estis adopto de infano ene de la familia amo.

Adopto tie estis ion tre malsama. Temas pri adopto fare de potenculo, la adopto fare de Dio!

Ni klopodu nun kompreni: kiam la imperiestro aŭ iu reĝo komprenadis ke la fino de sia vivo alproksimiĝis, li ne lasis la regnon kiel eredaĵon al la filoj kiuj kutime kreskis kiel eĉ la brusto de Dio! Li anstataŭe elektis sian eredonton inter siaj generaloj, inter siaj plej kuraĝaj homoj, kiun li opiniis havanta siajn samajn kvalitojn por povi daŭrigi la imperion kiel li jam faris kaj eĉ pli bone.

Jen (tute proksimume) kion signifas esti adoptaj filoj de Dio! Dio tiel nin estimas kaj super ĉio Dio tiom bezonas nin ke Li nin petas kunlabori al Sia krea agado.

Kunlabori al la krea agado

La kreo ne finiĝis! Ĝis kiam estos malbono kaj sufero en la mondo la kreo ne finiĝas.

En la unuaj ĉapitroj de la "Genezo" ni legas pri tiu paradizo, pri tiu harmonio inter la viro kaj la virino, inter la homo kaj la naturo! Nu tiu ne estas priskribo de paradizo neripareble perdita, sed ĝi estas antaŭanonco de konstruenda paradizo. Kiel? Kunlaborante en la krea agado de la Patro.

Antaŭ la kreo de la mondo pri kiu pensis Dio? Li pripensis ĉiujn kiujn estus povintaj kunlabori kun Li kaj kiel Li en la kreo la mondo. Kaj kiel oni kunlaboras en la kreo de tiu ĉi mondo? Kion strangan oni devos fari? Jen la surprizo: "benataj! Ĉar mi malsatis kaj vi donis al mi por manĝi". Jen ĉio: kunlabori en la krea agado de la Patro signifas praktiki en la vivo agojn kiuj donas la vivon al la aliaj.

Jen ĉio: "mi soifis kaj vi donis al mi por trinki, mi estis fremdulo kaj vi gastigis min. Mi estis nudulo kaj vi min vestis, mi estis malsana kaj vi min vizitis". Por kunlabori en la kreo sufiĉas havi ameman respondon, mizerikordan respondon al bezonantoj. Kunlabori en la krea agado de Dio signifas komuniki vivon al kiu ne havas ĝin.

Dio la Patro ne petas por Si mem

Sed ĉu vi rimarkis? Temas pri ses agoj teologie nomitaj la ses mizerikordaj faroj; en neniuj el ili estas konsiderata la konduto rilate la diaĵon.

Tiuj estas benataj de mia Patro, ne ĉar ili preĝis, ne ĉar ili kredis aŭ faris oferadon, sed ĉar ili donis la vivon al aliuloj.

Granda parto de la homaro ne konas Dion, la plimulto de la homaro Lin rifuzis, eble "prave", pro la fakto ke, estante prezentita tiel terurige neniuj homoj rezonanta per sia propra kapo povus akcepti tian Dion.

Eĉ diris al ni la Vatikana Konkilio ke la kulpo, la precipa respondeco de la ateismo falas sur ni kristanoj.

Kiam prezentiĝas la Patro de Jesuo malfacilas ke homoj povu Lin rifuzi, krom se ili havas apartajn problemojn. La Patro de Jesuo ne malplifortigas la homojn, male, lin plifortigas. La Patro de Jesuo Sin metas je la servo de la homoj, tial Li ne povas esti rifuzita; sed la Dio kiu minacas, kiu punas, kiu kondamnas, tiun la plimulton de la homaro, prave, rifuzas.

La lasta juĝo por la nekredantoj

Tiam por tiuj ĉi homoj kia estas la juĝo? Kio permesos al ili havi la eternan vivon?

Ne la rilato (kiun ili ne havis) kun Dio, sed la rilato kiun ili havis kun la aliuloj.

En la hebrea kutimo por ekaparteni al la beno, al la Dia rekompenco, oni devis observi la leĝon. Sed Jesuo forprenas la leĝon: kion Dio intencas, ne estas ĉu vi observis la leĝon, sed ĝi estas vian sintenon al la aliulo.

Jen la novaĵo alportita de Jesuo: la novaĵo de Jesuo estas ke ĉe la horizonto de la kredanto staras nur la bono de la aliulo. Estas nenio alia. Ne estas la leĝo kiu fiksas la konduton de la homoj, sed estas mizerikorda sinteno rilate la bezonulojn kaj la suferantojn de la tergloba.

Mi estis prizonulo kaj vi min vizitis

Ni flankenlasis la lastan faron de Jesuo ĉar ĉiuj aliaj mizerikordaj faroj, escepte de tiu ĉi estis jam konataj en la antikveco: ankaŭ ĉe la paganaj verkistoj troviĝas tiuj ĉi listoj da mizerikordaj faroj. Sed, kaj en la religiaj verkoj, kaj en la paganaj verkoj ne troviĝas tiu ĉi kategorio kun kiu, nun, la Sinjoro identiĝas kun la lastaj en la komunumo; Li identiĝas kun la malsatuloj, la fremduloj, la soifantaj homoj, Li identiĝas kun la senvestaj homoj, kaj, afero vere skandalema por la tempo, Li identiĝas kun la prizonulo!

La prizonulo estis konsiderata kiel homo prave punita pro siaj kulpoj. Al la prizonulo ne estis kompatsento aŭ mizerikorda sento: li responsis pri sia kondamno. La prizonuloj estis la plej forlasitaj el la forlasitoj!

Viziti la prizonulojn ne estis etvaloraĵo! Tiuepoke la prizonuloj estis enkarcerigitaj... atende de la ekzekuto. Ili ne estis vivtenataj dumvive en la karceroj. Kaj ilia transvivo ne estis konfidita al karcergardistoj: tute male, devis esti la familianoj aŭ la geamikoj kiuj alportis al ili ion por manĝi. Pri tio ne zorgis la karcergardistoj.

Viziti la prizonulon ne signifis....viziti iun por lin konsoli; anstataŭe, tio signifis doni iom da vivo al tiuj homo kiujn la civila komunumo ne konsideris indaj je ĵu ajn kompatsento. La atento al la prizonuloj estos konstanta elemento en la misio de Jesuo.

Antaŭ Jesuo la justuloj (en la Biblio la justulo signifas la fidelulon) estis "fidelaj" je la observado de la leĝo; kun Jesuo ĉio ŝanĝiĝas: ne estas plu la leĝo kiu determinas la homan konduton, sed estas la amo al la aliulo. Tiuj kiujn Jesuo nomas justulojn ne estas plu la observemaj al la leĝo, kontraŭe ili estas la fideluloj je la amo al aliuloj.

Jesuo renversas la rilaton inter la kredantoj

Al homoj kredantaj je religio, Moseo, la servisto de Dio, trudis pere de la teruro kaj timo interligon inter la "servistoj" kaj ilia mastro, kiu baziĝis sur la obo; Jesuo, la filo de Dio, proponas rilaton ne plu inter servistoj kaj ilia mastro, sed Li proponas rilaton inter la filoj kaj la Patro; rilato ne bazita sur la observado de la leĝo, sed sur la akcepto kaj la simileco de Lia Amo.

En la religioj, do, la kredanto estas kiu obeas al Dio, observante Siajn leĝojn; kun Jesuo la kredanto estas kiu similas al Patro, praktikante Amon kiel la Lia. Kaj la Amo de la Patro estas amo kiu direktiĝas al ĉiuj bezonantaj kreitaĵoj sed "nenion petinte" .

Li ne petas al prizonulo: ĉu vi estas tie? Do, vi tion meritis! Nenion Li petas al fremdulo, Li ne petas al malsatulo kial li malsatas. Li pridemandas nenion: la fakto ke oni malsatas jam sufiĉas kiel motivo por doni al iu manĝaĵon.

La justulo kun Jesuo ne estos la fidela observanto de la Leĝo (kiu ne plu determinas la sintenon de la kredanto): fakte estas la leĝo kiu malebligas al la homoj la alproksimiĝon al Dio. Estas La leĝo per la kategorioj de la puraĵo kaj de la malpuraĵo kiu apartigas la homojn disde Dio.

Ĉiu leĝo, kiom ajn bona ĝi estas, ne povas kontentigi la bezonojn kaj la necesojn de ĉiuj homoj. Se ni klopodos fari leĝon, eble ĝi kontentigos la plimulton sed ne ĉiujn kaj tiam la aliaj estas ekskluditaj. La leĝo kvankam ĝi

estus dia leĝo, ĝi ĉiam flankenpuŝas la homojn: fakte kelkiuj povas observi tiujn regulojn, aliaj povas ilin observi koste de grandaj rezignoj, aliaj pro iliaj religia, morala, civila, situacioj estas malebligataj ilin observi. Kaj, do, ili pro la religio mem restas forĵetitaj de Dio.

Do, estas la leĝo kiu malproksimigas la homaron de Dio, kiu malhelpas la homojn sin turni al Dio. Pro tio kun Jesuo ne plu la leĝo sed la amo determinas la homan sintenon.

Kiam ni vin vidis malsata?

Tiam ili Lin demandas: "Sinjoro kiam ajn ni vin vidis malsata kaj ni donis al vi por manĝi, soifanta kaj ni vin donis por trinki, kiam ni vin vidis fremda kaj gastigis vin. Senvestigita kiam ni vin vidis kaj ni vin vestigis? Kaj kiam ni vidis vin malsana aŭ malliberigita kaj ni venis vin viziti?". Kaj jen la sensacia respondo de Jesuo. Jesuo kiu sin prezentis kiel "filo de la homo", poste kiel "paŝtisto" kaj nun kiu sin prezentas kiel "reĝo" li diros: "vere mi diras al vi ĉiujfoje kiam (nome, ĉiujn fojojn) vi faris tiaĵojn al ununura el ĉiuj miaj nekonsiderindaj fratoj".

La nevideblaj, la nekonsiderindaj homoj kaj la piuloj

Jesuo nomos fratojn Siajn disĉiplojn, sed ĉi tie Li antaŭanoncas ke la fratoj estas la nekonsiderindaj homoj. Tiuj homoj kiuj estas "la nevideblaj", "la nekonsiderindaj", la homoj kiujn ni ignoras tiuj estas la fratoj de Jesuo. Jesuo ilin rigardas siaj amikoj. Se vi faris tiaĵojn al ununura el tiuj miaj plej etaj fratoj, nome al nekonsiderindaj homoj, tion vi faris al mi.

Jesuo taksas farita al Li kion oni faras al aliuloj, tamen, atentu! Ĉar maljusta interpreto koncerne tiun ĉi biblian pecon allasis tiun hipokritan spiritualecon kiu vidas Kriston en la povrulo.

La surmenciitaj homoj helpis la malsatulon ne ĉar ili vidis Kriston en li (konsidere ke ili ne rekonas Lin) sed ĉar li malsatis. Ili ne akceptis la fremdulon ĉar ili opiniis akcepti Kriston, tiuj ĉi nenion scias pri la Sinjoro; fakte ili surpriziĝas; sed kiam ajn ni donis al Vi por manĝi, kiam ni gastigis Vin? Tiuj ĉi homoj agis por la bezonuloj, ne por la Sinjoro.

Hipokrita interpreto koncerne tiun ĉi biblian pecon naskis tiun kunligigon kiu sugestas ami la aliajn ĉar en ili staras la Sinjoro. Terura hipokriteco! Mi devas ami la povrulon, kial? Ĉar li estas povrulo, ne ĉar en li estas Kristo. Kion ili dirus se ili malkovrus ke en la malsatulo ne estas Kristo?... Ili konkludus: "ke vi, malsatulo, restu tian kia vi estas!"

Oni ne amas la aliulojn ĉar en ili staras la Sinjoro! Sed per la Sinjoro kaj por la Sinjoro oni amas la aliulojn tiajn kiaj ili estas. Oni ne devas pripensi la dian rekompencan!

Kaj ni revenas al la kutima rekantaĵo! En la religio la alvenpunkto estas Dio; tio ĉio kiu en la religio la homo faras Li tion faras por Dio (mi preĝas al Dio, mi servas la aliulon ĉar, poste, Dio min rekompencos, mi tiamaniere akiras meritojn ĉe Dio). Kun Jesuo, Dio ne plu estas la alvenpunkto de la homa ekzisto, sed Li estas la komenco de la ekzisto. Estas Jesuo kiu iniciatas nin ami kaj ni envolvitaj en tiu ĉi amo kun Li kaj kiel Li ni amas la aliulon tiel kia li estas: kaj li estas pedikhava, kaj li estas malpura, kaj li estas malsimpatia.

Dimanĉe la 13an de Januaro 2008*